

William Shakespeare,
Soneto 1

tradukita de Manfredo Ratislavo

Pliiĝon ni deziras de la dioj,
Por ke pludaŭru ĉiam la beleco
Kaj ke per novaj hom-generacioj
La viv' ne ĉesu en la estontec'.

Sed vi, kontenta pri supraĵa sci',
De via fajr' avara memnutranto,
Malsaton en abundo faras vi,
De via mem' vi estas minacanto!

De la juneco freŝa vi ornam',
Heroldo sola de l' printemp-sezon',
Kaŝiĝas en la brusto via flam',
Perdiĝas tiel la plej kara bon'.

Eluzu vian donon, por ke ĝi
Ne neniĝu en la tomb' kun vi.

*Traduko de la Angla poemo "Sonnet 1" de WILLIAM SHAKESPEARE (*1564-04-13 - †1616-05-03) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-12-20.*

MR-110-01 / Arg-491-954 (2009-03-27 11:06:43)

Esperantigo laŭ la germanigo verkita de Johann Gottlob Regis (Johano Diopaco Regiso, 1791 - 1854)

William Shakespeare,
Sonnet 1

From fairest creatures we desire increase,
That thereby beauty's rose might never die,
But as the ripener should by time decease,
His tender heir might bear his memory.

But thou, contracted to thine own bright eyes,
Feed'st thy light's flame with self-substantial fuel,
Making a famine where abundance lies,
Thyself thy foe, to thy sweet self too cruel.

Thou that art now the world's fresh ornament.
And only herald to the gaudy spring,
Whithin thine own bud buriest thy content
And, tender churl, makest waste in niggarding.

Pity the world, or else this glutton be,
To eat the world's due, by the grave and thee.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas WILLIAM SHAKESPEARE (*1564-04-13 - †1616-05-03).*

Arg-491-953 (2009-03-27 11:02:05)